

Max von Schenkendorf,  
Ho liber', adore

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ho liber', adore  
Mi ja amas vin,  
Mi deziras kore:  
Venu je la fin'!  
Ĉu vi venos iam  
Al ni, la homar'?  
Ĉu vi restos ĉiam  
Inter la stelar'?

2. Ankaŭ en arbaro,  
Kie migras mi,  
Kaj sub rev-floraro  
Ja troveblas vi.  
Estas vivo vera,  
Kiam regas vi  
Sur la rondo Tera,  
Tiam ĝojas ni.

3. Kiam alrigardas  
Ni amike nin,  
Kiam kisoj ardas,  
Amas nin knabin'...  
Sed ne haltas iam  
Tiu kor-dezir',  
Al ĉielo ĉiam  
Strebas la sopir'.

4. Venas kanto mia  
El trankvila land',  
Bilda idilia  
Estas mia kant'.  
Floras flor' ĝardena,  
Estas multe da  
Spikoj eĉ en jena  
Ŝtona mondo ja.

...

5. Kie Dia flamo  
Brulas en la kor',  
Kun fidel' kaj amo  
Al la propra mor';  
Kie sin defie  
Ligas por justec'  
Kuraĝuloj, tie  
Regas liberec'.

6. Inter urbaj muroj  
Povas ŝveli kor'  
Por preĝejoj turoj,  
Por prapatra mor',  
Strebas supren tiam  
Lumen al altec',  
Pretas morti, kiam  
Vokas liberec'.

7. Ho, efektivigu  
Dia la favor',  
Plene profundiĝu  
En la homa kor'.  
Ho liber', aminda,  
Kara estas vi,  
Ege dezirinda,  
Venu vi al ni!

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (\*1783 – †1817) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-01-29.*

MR-445-1 / Arg-340-682 (2006-02-01 16:00:35)

*La kanto estas kantata laŭ la melodio de Karl Groos (1789 - 1861).*